

SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN LA ESPERO

Nov. 1945

33 årg. Nr 11

ORGAN FÖR SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET

Hjälp

**utländska esperantister
med kläder och kontanter.**

I likhet med det danska esperantoförbundet har SEF nu beslutat organisera hjälpverksamhet till våra esperanto-kamrater i de krigshärjade länderna. Genom brev ha vi kommit i nära kontakt med den skriande nöd, som där råder. Och trots att så många insamlingar ordnats i Sverige, vända vi oss nu till er med bön om hjälp.

Fru Anna Alamo berättade på Stockholms-klubbens förra sammanträde, att en fransk familj sålde sitt hus och sin vackra trädgård för att få pengar att underhålla de 7 barn, som familjen tagit hand om under kriget. Så handlar den stora kärleken. Men vi svenskar anses ju vara mindre impulsiva. I varje fall bör vi kunna göra rent hus i våra garderober och våra vindar. Våra utländska vänner lider brist på allt: skor, kläder, underkläder, sängkläder och handdukar, ja allt i textilväg.

Kära svenska esperantister! Ni har säkert något par skor ni kan avvara eller en gammal rock eller klänning, som ni just nu inte vill ha på grund av att den är omodern, färgen är blekt o. s. v. Eller ni har några strumpor, som är för tjocka, för små eller i en färg, som ni ledsnat på. Skänk sådant, och ni hjälper en medmänniska, som välsignar er hjälp! Vi äro vissa på att vi i en fråga som denna icke förgäves vädja till esperantister.

SEF har lyckats få möjlighet att förmedla sändningar till Holland, Polen och Tjeckoslovakien. En kommitté med fru Anna Alamo i spetsen står för insamlingen. Alla paket sändas under adress:

F R U K A R I N H Ä G G L U N D
Pontonjärgatan 35,
STOCKHOLM.

Vintern står för dörren. Sänd därför ert bidrag så snart som möjligt, så att paketen komma fram före julafton. Om någon har en personlig vän i nyssnämnda länder, få paket gärna adresseras till vederbörande.

Alltså: Sänd ert julpaket till utlandets esperantister!

Den som önskar sända kontanter såsom hjälp till transportkostnaderna eller till inköp av klädespersedlar kan insätta belopp på Svenska Esperanto-Förbundets postgirokonto 20 12.

Svenska Esperanto-Förbundet.

**La esperantista ekspedicio al la sun-
eklipso la 9:an de julio 1945.**




Foto: la verkisto.

Kiam la direkcio de Esperanto-Instituto de Finnlando decidis aranĝi someran kurson en Punkaharju la 8—14:an de julio en ĉi tiu jaro, mi akceptis la taskon de ties gvidado kun plezuro sed — kun rezervo de la 9:a de julio por la suneklipso, ĉar jam antaŭ pluraj jaroj mi decidis, aŭdinte pri la eklipso, aranĝi tiel, ke mi povos fotografe dokumenti la fenomenon.

La solaj informoj, kiujn mi havis, estis noto de la lumforto de la korono, la tempo de la plena eklipso kaj la loko, kie la centra linio de la eklipso tranĉas la publikan vojon inter Kerimäki kaj Joensuu. Ĉiujn tiujn informojn mi ricevis en la ŝtata geodezia institucio.

Mia observejo estis transportata per biciklo al la loko: la domo Hirvola en la vilaĝo Yläkuona de la komunumo Kerimäki. Laŭ la "ekonomia" karto (1:100 000) ĝia situo estas 61° 58' 23" de norda latitudo kaj 4° 18' 48" oriente de Helsinki. Kiel kunlaboranto partoprenis instruisto J. N. Mikkola, bone konata al la finlandaj esperantistoj.

Mia aparataro estis jena: du aparatoj Leica, el kiuj unu de la modelo "standarda" (t. e. la plej simpla modelo) kaj la alia "IIIa", preskaŭ la lasta vorto de la tekniko, se oni ne kalkulas nekonatajn fruktojn de la milita uzado de Leica. El miaj tri objektivoj la "Telyt" estis destinita al fotografado de la eklipso — ĝi kapablas redoni la diskon de la suno kun diametro de 2 mm proksimume. La "Xenon" estis rezervata por koloraj fotografadoj de la ĉirkaŭaĵo kaj la "Hektor" estis uzata nur por registri la aspekton de la loko de miaj observejoj. Kiel aldonaj iloj sekvis ligna stativo sufiĉe firma kun klinebla kapo kaj aldona artiklo kun ŝraŭbo

regulilo, la fotoĉela mezurilo "Sixtus" (por la koloraj fotografadoj) kaj fine kelkaj pecoj de vitro, kiujn mia kunlaboranto sro Mikkola nigrigis per fulgo en la loko de observado. La filmo uzita estis la mikrograjna Iso-pan F de 17/10°DIN, kaj mi decidis uzi la plenan aper-turon de mia objektivo "Telyt", 1: 4, 5, kaj la espozan tempon de 1/60 sekundo dum la fotografado de la plena eklipso. Dum la komenca kaj fina periodoj la tempo estis 1/500 sek. kun aperturo 1:36. La aldona kapo de stativo estis metata je la klineco de ĉ. 22°, kaj la turna akso de la kamero estis proksimume paralela kun la akso de la tero. Kiam la teleobjektivo estis surŝraŭbita, mi povis konstati, ke la suno estis videbla sur la malpolurita vitro de la spegulcelilo de Telyt.

Nun estis fotografata la korto, kie la observado okazis, per la larĝangula Hektor, la nomita objektivo malŝraŭbata el la kamero (Standard Leica) kaj tiu alŝraŭbata al la Telyt, por servi kiel "kaseto" al ĝi. Tuj la fotografado komenciĝis, ĉar kiam la aranĝoj estis tiel pretaj, la komenca periodo de la eklipso jam estis atingita. Entute mi espozis 15-foje dum la komenca periodo, kiu daŭris ĉ. unu horo, unue kun interspacoj de ĉ. 5 minutoj, poste proksimume ĉiuminute. Dum la plena eklipso (ĉ. unu minuto) mi faris kvar espozojn. Dum la tria periodo mi faris 16 fotografadojn, ĝis preskaŭ la fino de la eklipso. Ĉe la rivelado mi konstatis je mia surprizo, ke unu el la espozoj okazis ĝuste en la momento, kiam la suno reaparis depon la luno. La korono estas ankoraŭ plene videbla, sed ĉe la flanko jam brilas la nekovrita suno je unu punkto.

*

Kio nun estas la sperto de miaj observoj? Unue oni devas noti, — por la profito de estontaj generacioj — ke la lumforto de la korono nur tre kondiĉe povas esti nomata egala al tiu de la plenluno. Per kvar- ĝis okobla espozio oni sukcesas registri nur la partojn relative proksimajn al la lundisko, kaj per rimarkinde pli longedaŭra espozio oni certe povas atingi bildojn de la pli distancaj partoj de la korono. Detala esploro de la bildoj, kiujn mi faris, tamen montras, ke la sinsekvaj bildoj, faritaj kun tempospaco de 10—20 sek, diferencas inter si. Espozoj, kiuj daŭras tutajn sekundojn, povas sekve doni nur integralajn bildojn de la dumtempaj lumfenomenoj. Pro la pli granda lumforto de la internaj partoj estus, por ricevi ĉiujn registreblajn detalojn, plej utile fari serion da espozioj kun laŭcele dozita serio de la espozio tempo (aŭ aperturo), komencante per la espozio adapta al la plenluno. Konvena serio estus, ĉe uzo de filmo 17/10°DIN kaj aperturo 1: 4,5, jena: 1/500 1/50 1/5 sek.

*

Fine mi povas rimarki, ke la scienca ekspedicio aranĝita de la ŝtata geodezia institucio de Finnlando, kiu en Kagaslampi observis la suneklipson priparolitan, estis sub gvido de doktoro Uuno Pesonen, la prezidanto de la subtena societo de Esperanto-Instituto de Finnlando. Ĉi tie ĉeestis profesoro K. Väisälä kiu estas malnova esperantisto, kaj ankaŭ sveda esperantisto d-ro E. Olsson, kiu rakontis al ni, ke dum la laboroj de la ekspedicio la lingvo esperanto ludis ne malgrandan rolon.

V i l h o S e t ä l ä.

LITERATURO.

F. Bernadotte: La Fino. (El la sveda: St. Engholm, Eld. Societo Esperanto Sthlm, kiel la unuan libron de la Literatura Klubo: "Stelo-Libro". 142 p. Prezo: svedaj kr. 5,80 resp. 6,80. La lasta prezo validas por binditaj ekzempleroj.)

Komence de la libro oni povas legi la jenajn karakterizajn vortojn: "Kiam mi sidis en la flugmaŝino" — ĉirkaŭ la jarturniĝo en 1944/45 grafo Bernadotte tiam estis reveturanta el Londono al Stokholmo — "miaj pensoj ŝvebis ĉirkaŭ la demando... ĉu estas eble por Svedujo fari ion valoran en Germanujo, fari paŝojn por mildigi almenaŭ iom el la teruraj suferoj, kiujn kaŭzas la germana koncentreja sistemo, savi almenaŭ kelkajn el tiuj homvivoj, kiujn minacas baldaŭa pereco en teruraj cirkonstancoj?" Tiuj pensoj estis la komenco de tiu humana laboro, per kiu Svedlando distingis sin je la plej granda dankemo de la homaro fine de la milito kaj post tio. La preparado, la malfacila ekirigo de tiu ĉi laboro estas dankebla al la senlaca kaj ĉiun riskon akceptanta agado de la aŭtoro, kiu venis en kontakton kun la tuta malbonfama aparato de la naciisma gvidantaro kaj kiam proksimiĝis la tempo de la granda kolapso, li ricevis gravan rolon en la preparo de la armitricaj pritraktoj. Ke tia agado proponas sensacian materion por libro, estas sendube kaj la originalo de tiu ĉi libro atingis fantazie altan eldonnombron. La esperanta eldono estas tre bonvena, tre grava, ĉar la libro antaŭ ĉio havas veran dokumentan valoron, ĝia spirito estas pura humanista kaj krom tiuj tre gravaj ecoj ĝi donas tre karakterizajn bildojn pri tiuj figuroj, kiuj dum memorinde teruraj jaroj direktis la politikon de la kontinento. La stilo de la aŭtoro estas simpatie objektiva. Oni havas la senton, ke li volas preskaŭ kaŝi sian personan agadon, gravaj estas nur tiuj gigantaj okazaĵoj, kiujn li prirakontas. Ĝuste per tio donas la libro la senton de la absoluta konfidindeco kaj dokumenta valoro, kiun ĉiu leganto devas senti.

La traduko de St. Engholm estas klasike puritana, bela kaj valora. Tamen io, kion oni ne povas aprobi, estas la troa mallongigo de la datoj: La 9 de marto anst. la 9-an de marto. Tiun formon Engholm konsekvence uzas, sed tio povus misgvidi tiujn, kiuj ne tute kutimiĝis al la esprimmanieroj de la lingvo. Supozeble io ellasiĝis el la jena frazo, trovebla sur la 32-a p.: "Li asertis, ke rusaj bombmaŝinoj antaŭ 6 monatoj estos super Stokholmo, se Germanujo perdos la militon..." Oni sentas, kvazaŭ la pli kompleta formo: antaŭ la paso de 6 monatoj tiun ĉi fojon estas necesa. La tria rimarko rilatas la formon "li estis interesita" al kiu mi preferus aŭ "li interesiĝis", aŭ "li estis interesata". Sed en ĉiuj ceteraj detaloj oni povas nur rekomendi al ĉiuj legi la libron ankaŭ el la vidpunkto de modela tradukverko.

F. S.

ÅTER PÅ LAGER!

BREVKORT med svensk propagandatext om Esperanto. Texten ger i korta drag det väsentliga om vårt språk. God propagandaeffekt — använd detta kort vid all korrespondens med utomstående.

Pris: 10 st. 0.40, 100 st. 3.50 + 15 % för oms och porto.

PROPAGANDAMARKEN, grön stjärna på vit botten, gummerat papper, mycket användbara och trevliga — bör återfinnas på varje Edert brev eller kort.

Pris 100 st. 0.50 (+ 15 % för oms och porto).

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 190 71 STOCKHOLM 19 Postgiro 578

HELA LASARET

får Ni Esperanta Studservo, om Ni inbetalar kr. 3:50 till postgirokonto 387 14 (Malmö Esperantoförening).

Adi: La forto de l'vero (Legolibro en la formo de romaneto, 64 p. eldonis la Dana Esp. Eldonejo, Aabyhøj, 1945. Prezo 2.50 dan. kr.)

La unua hirundo de la esperanto-somero alvenis. La libro, dediĉata al pedagogia celo, kiel literaturaĵo estas tre senpretenda kun naiva, sed tre, eĉ treege okazoplena rakontoteksado. Temas pri disigo de du amantaj koroj per intrigulino, kiu amare pentas, tamen ne pli frue ol sur sia mortolito, sed ne tiel malfrue, ke la geamantoj post amaso da vojaĝoj, aŭ erarvagadoj, subitaj ŝanĝoj, fine ne povus renkontiĝi kaj unuigi sian sorton en la Internacia Somera Lernejo de Elsinoro. Vi ne povas imagi, kiom da okazaĵoj povas tumultiĝi sur 64 paĝoj, inter ili ankaŭ multe da esperantrilataj kaj je la laŭdo de la libro oni povas noti, ke ĝi donas diversajn interesajn detalojn de la movado, kvankam kelkfoje altabligante ilin en tro rozkolora saŭco. Sed la komencanto certe ne enuos tralegantante la libron, kies stilo estas facila kaj grandparte konvena. Sed, bedaŭrinde, ĝi enhavas konsiderindan amason da lingvaj malkorektaĵoj, kiuj speciale ne rajtus ekzisti en legolibro kaj nepre ili devus esti forigataj el sekva eldono. Plej embarasa estas la intermikso de la imperativo kaj futuro, kion montras multaj ekzemploj. Jen kelkaj: "Li esperas, ke baldaŭ li revenu" (anst. revenos p. 13.) "3 tagojn ŝi povis resti ... antaŭ ol ŝi ekvojaĝu (plej bone: antaŭ sia ekvojaĝo, p. 23) "Post tio ili revenis al lia domo kie ili tagmanĝu" (plej ekzakte: kie ili estis tagmanĝontaj, aŭ kie ili intencis tagmanĝi, aŭ: por tagmanĝi tie.)

Kelkloke la stilo estas peze cirkonstancema: B. ĉirkaŭbrakis Hanne kiun ŝi ĝis tiam ankoraŭ ne vidis" (kiun ŝi neniam vidis pli frue). La vorto "sekigi" estas skandinavismo, oni ne "sekigas", sed viŝas la "okulojn", same kiel oni viŝas sin, aŭ meblojn ktp. Tiu ĉi registro de korektotaj partoj en neniun direkton misgvidu la leganton: entute la libro estas — el lingva vidpunkto — lerte kun-

metita legaĵo, kiu speciale bone povos servi al komencantoj, speciale post la korekto de tiuj ĉi kaj kelkaj aliaj lingvaj malĝustaĵoj, aŭ nepraktikaj esprimoj; ĝi estas bona legolibro sen literaturaj pretendoj.

F. S.

D:ro Dorner: Romano de H. L. EGERUP, eldonita de Dansk Esperanto Forlag, Aabyhøj, 208 paĝoj. Prezo ĉe Eld. Soc. Esperanto, Stockholm 19, kr. 6.50.

Tiu nova libro jam pro sia grandeco kaj sia bela presado sur bona papero altiras nian intereson en tiu tempo de malriĉo je esperantaj libronovaĵoj — Sed ankaŭ la enhavo estas eksterordinara. Kvankam la verkisto tre malrapide enkondukas la leganton en la delikatan temon, por kiu li volas propagandi, oni ne kuragas rekomendi ĝin al sentema homo sed nur al tiu, kiu ne timas aŭskulti la diskutadon pri tute novaj kaj aŭdacaj ideoj. La romanformo de la libro multe malpezigas la temon kaj tenas la intereson streĉa tra ankaŭ la pure medicinaj klarigoj, kiuj plenigas multajn el la dialogoj inter la ĉefpersonoj de la libro, kiam ili priparolas la kialojn kontraŭ kaj por artefarita gravedigo kiel metodo por povi korpe kaj anime plialtigi la homaron.

LA VERDA FOLIO eldonita de la Monda Ligo de Naturamantoj nr 2 venis. Prezo: 2 respondkuponoj senditaj al S-ro Derrick P. Faux The Bungalow New Drive Painswick (1), England.

OKAZAS NENIO, tre facila legolibro, originale verkita en esperanto de Chr. Hougaard. Prezo: 2 dan. kronoj. 63 paĝoj.

La verkisto rakontas per simplaj vortoj kaj mallongaj frazoj pri familia vivo en dana malgrandurbo dum la milito. Bona enkonduko en la esperanto-legadon por komencantoj kaj ne sen intereso ankaŭ por aliuloj.

PER UNO VOĈO organo de la Esperanto Kunularo aperigis sian septembran numeron el Johannesburg, Sud Afriko. Ĝi i. a. rakontas pri la restarigo de SAT, Senacieca Asocio Tutmonda, en Parizo, kie kelkaj esperantistoj ne ĉesis kunveni regule dum la milito kaj inter decembro 1942 kaj aŭgusto 1944 dissendis centojn ekz. de LETERO (aperis 8 numeroj). Depost decembro 1944 tiu LETERO transformiĝis en BULTENO DE SAT-AMIKOJ.

Tre utilaj eldonaĵoj.

Aeronaŭtika Terminaro (E. D. Durrant)

Armea Terminaro (E. D. Durrant)

Terminaro por infan-ludoj

(Komitato de Britaj Esperantistaj Geinstruistoj)

Muzika Terminaro

(M. C. Butler kaj F. Merrick)

Radio-Terminaro (A. Venture)

Prezo por ĉiuj kvin: 4.50 kr. + 15 % por imposto kaj afranko.

" " aparta vol. 1.— kr. + 15 % por imposto kaj afranko.

Certe multaj esperantistoj, al kiuj ĝis nun mankis tiaj terminaroj, bonvenigos la nov-eldanojn.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fako 190 71 STOCKHOLM 19 Postgiro 578

NU

kan ni korrespondera igen.

Använd då våra vackra vykort med esperantotext (äkta fotografi). Vyer från Stockholm (10 olika), Göteborg (2), Malmö (2), Norrköping (2), och Lappland (2 olika). Pr st. 0.15, 10 st. 1.20.

Fotografiska kort från Stockholm med esperantotext. Format 7×9 cm. 12 olika. Pr sats 1.—.

Brevkort med Sveriges karta. Tryckt i 3 färger. Avsändaren utmärker med ett x den plats, där han är bosatt. Detta kort torde intressera utlänningen i hög grad, då Sverige fortfarande är mycket uppmärksammat. Pr st. 0.15.

Svenska nationaldräkter. De svenska nationaldräkterna ha alltid väckt starkt intresse i utlandet. Pr sats om 8 st. 1.20, pr st. 0.15.

Till ovanstående priser kommer 15 % för "oms" och porto.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fack 190 71. STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

SESDEKJARULO. La 18 oktobro nia samideano la licea instruisto CARL OHLSSON, Bollnäs, atingis sian 60-jartagon. Plej konata li estas inter ni kiel verkisto de la tre ŝatata vortaro Dubbel fickordbok i esperanto, bona amiko por ĉiu sveda esperantisto je liaj unuaj paŝoj. S-ro Ohlsson estas vera poligloto kun ekzameno en la tri, angla, germana kaj franca, lingvoj sed ankaŭ en la rusa kaj ĉeka lingvoj. Liaj scioj kaj liaj multaj eksterlandaj vojaĝoj faris lin tre interesa konatulo, al kiu ni nun post la festotago sendas niajn korajn salutojn.

La finnaj samideanoj

povas same kiel nunjare aboni "Svenska Esperanto-Tidningen" por sumo de 60 finnaj markoj pere de S-ro Joel Vilkki, Somero, kaj per lia poŝtgirokonto 602 53. Ni estus tre dankaj, se vi antaŭ la jarfino volus aranĝi la reabonon, kio bone helpas al ni rilate senhaltan ekspedadon. R e d.

Esperanta Libro-Agentejo en Finnlando.

Eldona Societo Esperanto, Stokholmo, interkonsentis kun S-ro Joel Vilkki, Somero, ke li surprenu al si la taskon esti agento por nia eldonejo. Do niaj finnaj samideanoj povas sin turni al li ĉe bezono de esperantaj libroj.

ESPERANTOBLADET

— de norska esperantisternas organ —

som skulle utkomma på nytt från och med september månad, har mött oberäknade och tills nu oöverkomliga svårigheter beträffande tryckningen — det fattas yrkesfolk även i vårt grannland. Det tryckeri, med vilket man från början gjort upp om tryckning, har inför omöjligheten att skaffa arbetskraft måst avsäga sig arbetet. Nu har man fått lov att söka sig till annat tryckeri och man ber de svenska abonnenterna, att de måtte ha tålmod — tidningen skall komma så småningom, hoppas man.

Tidningen kostar till årets slut 1 kr., och abonnemang mottages hos Förlagsföreningen Esperanto, Fack 190 71, Stockholm 19.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien.

Laŭ ricevita informo de S-ro Hugo Steiner en Wien nenio pereis en la muzeo dum la milito. Tamen la rusoj okupis la ejon en Neue Hofburg, sed la muzeo ricevis sufiĉan ejon en Alte Hofburg.

Sinha bonfartas.

Ĉiuj ni memoras nian karan amikon Sinha el la tempo, kiam li estis en nia lando. S-ro Malmgren nun informas, ke li havis leteron de li. Li estas edzo kaj havas du knabinojn. Li salutas ĉiujn amikojn.

La venonta Mond-Jamboreo de la skolta movado okazos en Francujo en aŭgusto 1947. Esperanto estos unu el la lingvoj uzataj, same ĉiuj prospektoj estos tradukataj en Esperanton.

Esperanta movado en Egiptujo lastatempe plivigliĝis En landaj gazetoj aperis artikoloj pri Esperanto. Estas tre menciinda artikolo kun la titolo "La lingvo de l'Estonto", kiu aperis en franca revuo Images.

GEEDZIĜO.

**ERIK OLSSON
KARIN HEMMINGSSON**
Malmö.

Naskiĝis:

Filino al Svea kaj Sixten Clausson, Malmö.
Filino al Anna-Greta kaj Jan Strönne, Malmö.
Ni kore gratulas.

A T E N T U

ĈIUJ ESPERANTO-ELDONEJOJ!

Ni havas grandan stokon de esperanto-literaturo. Petu niajn prezaron kaj kondiĉojn, sed bonvolu ankaŭ sciigi al ni pri la valutaj ebloj.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 190 71.

STOCKHOLM 19.

SEF Kolono

ESPERANTO ALUMETO 1945

19.000 skatoloj menditaj ĝis nun (30/10). Sed pli ol 40 kluboj ankoraŭ ne montris ian intereson pri nia entrepreno kaj tial ni ne kuraĝas mendi pli ol 30.000 ĉi-foje. Tiuj kiuj venas tromalfrue kun siaj mendoj tial verŝajne ne povas ricevi nun sed devas atendi ĝis alia fojo. Ni bedaŭras ke ni ne sendis la cirkuleron al ĉiuj membroj rekte, ĉar tiel ni certe estus ricevintaj multege pli da mendoj. Nun ĝi certe kuŝas en la skribtablo de la kluba sekretario kun multaj aliaj cirkuleroj, kaj pro multaj aliaj taskoj li tute forgesis informi la klubanojn pri ĝia valora enhavo (same kiel povas okazi ankaŭ ĉe ni kelkfoje). Tio kaŭzas ke la klubaj membroj, kiuj ne apartenas al la estraro, ne scias pri la eblecoj mendi esperantajn alumetojn je nia favora prezo 4: — kr. por 100 skatoloj. Nu, ni esperas ke vi, kiu legas ĉi tion, helpas nin vekti la klubestraron. Ĉi tiu bonega reklamilo devas vendiĝi ĉie en la tuta lando.

Jen la plej grandaj klubmendoj: Malmö — 4.000, Göteborg — ABF — 2.000, Stockholm — 1.500, Ystad — 800, Eskilstuna 700 kaj multaj 500 kaj malpli. Inter la rektaj membroj mendis ekz. Wallberg — Torsåker — 1.000, Johansson — Kalmar, Bengtsson — Kiruna, Eliasson — Örebro, Almén — Stockholm po 500 kaj multaj inter 100 kaj 400.

Do, la entrepreno tamen ŝajnas sukcesi kaj tial ni certe povas reveni jam printempe pri novaj alumetoj. Sed tiam ni bezonas novan etiketon, kiu estu vere alloga kaj bele desegnita. Kiu volas kunhelpi? Desegnaĵo prefere estu en formato 140 × 220 mm. t. e. 4-oble pli granda ol ordinara etiketo. Sendu ĝin al SEF, Tegelbacken, Stockholm.

AMIKARO DE SEF

3 novaj membroj aliĝis al Amikaro: Vetlanda Esperantoklubo, Esperantosocieto de Gävle kaj sinjorino Hilda Hansson, Malmö. Do, ĝis nun 51. Kie estas la aliaj 24? Ni ege bezonas ilin. Pripensu denove kaj esploru la eblecojn kune kun viaj geamikoj fariĝi membro de Amikaro de SEF. La kotizo. 15: — kr. po kvaronjaro, ne estas tiom alta, se oni estas pluraj kiuj dividas ĝin.

LA ESPERANTO-SEMAJNO

La afiŝo estis sendata al 238 lokoj, kelkaj ricevis 3, aliaj pli ol 100. La plej multaj el niaj kluboj kaj rektaj membroj "kompreneble" ne mendis afiŝojn, sed ni tamen sendis al ĉiuj kaj esperas ke ili metis la multekostan afiŝon en bone videblaj lokoj. Kvantam raportoj ĝis nun venis nur el ĉ. 15 lokoj ni tamen vidas la fruktojn de la propagando, ĉar ĉiutage venas en nia poŝto informpetoj kaj mendoj de la korespondkurso.

Dum novembro ni provos fari specialan propagandon en kelkaj urboj, kie ni nun ne estas reprezentataj de klubo aŭ rektaj membroj.

SEF ĉi tie kaptas la okazon esprimi sian tutkoran dankon al la esperantokluboj en Lidköping kaj Malmö pro valora helpo en la distribuado de la afiŝoj kaj propagandfolioj. Malmö ankaŭ promesis helpi pri la distribuo de la alumetoj. Se ekzistas alia klubo, kiu havas emon kaj eblecojn kunhelpi rilate tian laboron, ni volonte akceptos vian promeson.

Tutlanda matrikulo. Mi de sufiĉe longa tempo eldonas matrikulon pri tiom da svedaj esperantistoj, kies adresojn mi scias. Ni, mia kunlaboranto kaj mi, ĵus laboris pri la litero A en la dua eldono. Nun ni petas ĉiujn esperantistojn en l o k o j, k i e s nomo komenciĝas per iu el la literoj B—G, sendi al subskribinto informon pri sia nomo, profesio, adreso, esperantisteco ktp.

O s k a r S v a n t e s s o n
Fågelfångaregatan 20, Göteborg.

Gazetara informado. Jam de longe vi ne vidis reporton pri la gazetara servo. Sed je la fino de la milito kaj liberiĝo el la soldata servado mi eklaboris. Mi ankaŭ trovis bonajn helpantojn en Göteborg, kaj mi

esperas, ke ni kune povos iom atingi. Mi estas kompreneble tre scivola pri la efiko de la laboro, ĉar el la efiko oni povas tiri certajn konkludojn pri la plej bona maniero labori. Tial sendu al mi ĉi on, kion vi vidas en la gazetaro pri esperanto aŭ pri alia lingva problemo. Por iom instigi la intereson por kunlaboro, la Gotenburga Klubo ĉiumonate dislotas inter la sendintoj de kontribuoj premion de minimume 10:— kr. pomonate. Skribu al mi por ricevi prospekton!

*

Pri ricevitaj tondaĵoj mi raportas jene (la unua nombro = entute ricevitaj tondaĵoj, la dua = artikoloj pro Gazetara Informado): Januaro 10—0, Februaro 18—4, Marto 12—5, Aprilo 8—2, Majo 12—2, Junio 24—15, Julio 17—0, Aŭgusto 25—5.

Laŭ tiuj ciferoj Gazetara Informado estas la fonto por 27 % de tiuj artikoloj, kiuj aperis pri esperanto.

Oskar Svantesson,

Fågelfångaregatan 20, Göteborg. Tel. 14 93 43.

Sveda Instruista Esperanto-Federacio (Svenska Lärares Esperanto-Förbund)

Fågelfångaregatan 20
Telefon 14 93 43

Göteborg V
Postgiro 3 14 30

La internacia instruista movado. Jam la 22-an de Julio sro Korte skribis al mi leteron, demandante kiel ni provu restarigi la internacian instruistan movadon. Mi proponis, ke ni provu fari ian instruistan revuon, estu ĝi eĉ modesta. La abonantoj de tiu ĉi revuo estu la membroj de la instruista tutmonda asocio. Mi kredas, ke la francoj havas similan proponon.

Sro Korte deziras monon por la elspezoj. Tial li petis la eventualan bonhavoĉenon. Sed ni pagis la tuton al TAGE, kaj do ne estas bonhavo. Nun ni devas pripensi, kiel fari. Ian sumon ni prefere asigni por li, ĉu ne?

Li demandas kiel ni aranĝu pri la nova estraro. Certe estas plej bone, ke li kiel pli frue faru la unuajn esplorojn pri la restarigo. Li estas ema preni sur sin tiun taskon. Mi esperas aŭdi de pluraj instruistoj pri iliaj proponoj.

Oskar Svantesson.

La lernolibro de Szilágyi.

La kvina eldono de la praktika lernolibro de Dro F. Szilágyi ĵus aperis en Anglujo. Tio estas bona reklamo ne nur por la libro mem kaj ĝia verkisto sed ankaŭ por esperanto entute, ĉar oni ja ne povas presigi novajn eldonojn de libro, se ne la antaŭaj estas finvenditaj. Do, nia movado floras en Anglujo kaj la angloj preferas lerni nian lingvon pere de "A practical course in Esperanto".

Novajo:

SEP VANGOFRAPOJ

De Karlo Aszlányi — esperantigita el la hungara.

Tiu romano, la 7-a de la "Epoko-libroj" eldonita de The Esperanto Publishing, Londono, estas vere amuza kaj tre interesa. La juna Tenson MacPhab en ekscitita momento promesis al si mem, ke li en sep sinsekvaj tagoj traktos per vangofrapo la industri-magnaton Astor Terbanks, kiu insultis lin. Kiel li sukcesis je tio, kaj eĉ amkonkeris la filinon de Terbanks, estas la vere sprite farita intrigo de la libro. Oni ridas pro simpatio al la junulo.

Prezo: kr. 3.25 + 15 % por imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 190 71 STOCKHOLM 19. Postgiro 578

SVEDA KRONIKO



Esperanto Stando ĉe placo en Västerås.

Borlänge. Dudeko da geesperantistoj el 9 diversaj lokoj partoprenis la jarkunvenon de la dalekarlia esperantodistrikto, kiu okazis en "Församlingshemmet" Borlänge dimanĉe la 14-an de okt. Post bonvensaluto de la distrika prezidanto, la vorto estis tuj transdonita al nia verkisto, s-ano Stellan Engholm. En sia interesa kaj pensiga prelego E. parolis pri la internacia lingvo ĝenerale — kion homoj ordinare postulas de ĝi kaj kion ni esperantistoj postulas. La parolanto komparis la studadon de la angla kaj Esperanta lingvoj kaj donis konsilojn pri tio, kion ni respondu al eksteruloj, kiam tiuj demandas pri la valoro aŭ ebleco de Esperanto kiel internacia mondlingvo. En la fino de sia prelego E. akcentis la senkomparan porpacan signifon, kiun havas Esp. antaŭ ĉiuj aliaj lingvoj. Kiam ni esperantistoj energie kaj sinofere laboras por Esp., tiam ni bone servas por monda paco. Tiun plej gravan, porpacan signifon de Esp. ni devas ankaŭ montri kaj akcenti al aliaj personoj kaj organizoj kun samaj aŭ similaj celoj.

Post aprobo de estrara kaj kasista raportoj oni transiris al elektado de distrikta estraro por la nova laborjaro. Estis reelektata la antaŭa estraro, nome Karl Bengtsson (prez.), A. Vadfors (v. prez.), M. Jansson (sekr.), E. Lundvall (kasisto), kaj f-ino E. Bodén. La estraraj anstataŭantoj estis ankaŭ reelektataj, nome Gustav Johansson, V. Bonde kaj f-ino E. Karlsson. Kiel reviziistojn oni revokis la s-inojn Abrahamsson kaj Jansson, Borlänge. Post komuna kantado de "La Tagiĝo" ĉiuj kunvenintoj kune iradis al la "kafejo de Gilberth", kie oni ĉirkaŭ la kafotablo ankoraŭ dum unu horo gaje babiladis kaj diskutadis la komunajn problemojn. La du kunstantaj reprezentantoj por Eldona Societo faris dum la kunveno belan komercon per diversaj literaturaj Esperantaĵoj.

B. E. M. J.

Hishult. La aŭtuna laboro komencis la 4-an de sept., kaj la klubanoj studas i. a. esp.-kurson de Hermods.

Hälsingborg 5/10 45. "Gårdagens föredrag på Konsumsalen av redaktör Tiberio Morariu blev en angenäm upplevelse för den intresserade skara som infunnit sig. ABF:s ordf., fil. lic. Harry Olsson, konstaterade att det internationella tänkandet och handlandet har efter alla dessa år av nationell isolering åter kommit i förgrunden. Språkkunskaperna aktualiseras och därvid har esperanto sin givna plats.

Red. M., som är född rumäner, förde oss först — via

GLÖM EJ BORT

att prenumerera på Esperanta Studservo!
Gör det i dag! Postgirokonto 387 14 (Malmö Esperantoförening). Pris: 3: 50.

ljusbilder samt en film — till sitt vackra fädernesland, sädens, oljans och sångernas land. Han passade också på att framföra ett tack till hela svenska folket för den storartade hjälpverksamheten mot krigets offer och däribland många rumäner. Härefter hölls en provlektion i esperanto, i vilken samtliga närvarande deltog med stort intresse." (Skånska Social-Demokraten.)

6/10 45. "Esperanto ett världshjälpsspråk." Över detta ämne talade i går Svenska Esperanto-Förbundets konsulent, red. T. Morariu å Konsums föreläsningssal. Efter föredraget följde en lektion till på esperanto, i vilken språkets uppbyggnad och lättfattlighet åskådliggjordes.

Ett utomordentligt bevis för språkets användbarhet gavs efteråt då några estniska och polska flyktingar på esperanto talade om sina upplevelser här. Hur de tack vare esperanto kunnat knyta kontakt med den svenska befolkningen och därigenom kunnat känna sig mycket mera hemma än som annars skulle blivit fallet." (Sk. Soc.-Dem.)

Karlskoga Esperantoförening. För höstens kurser har klubben anställt ungraren dr Ferenc Szilágyi. 12 av klubbens medlemmar erhöll vid SEF:s årsmöte förbundets diplom för 10-årigt medlemskap.

Lidingö 12/10 45. Lumbildprelego pri Rumanio kaj esp. provleciono de Morariu ĉe la Suda Junulara Asocio en la lernejo de Sveda Misia Federacio por 35 anoj. 35 ŝlosiloj venditaj.

Lund 11/9. Post longa kaj interesa diskuto, la klubo decidis aranĝi du kursojn, komencan kaj daŭrigan. La komenca kurso de post la 21-a de sept. okazos ĉiun vendredon. La daŭriga kurso okazos ĉiun mardon.

MALMÖ 8/9. La aŭtuna sezono komenciĝis per dekjara jubilea festo de la studhejmo. Dum la somero ĝi estis renovigita de planko ĝis plafono. Eta rerigardo pri la hejmo faris s-ro Gösta Henriksson, li kiu tiel zorgeme ĉiam respondas ke ĉio tie estas en bona ordo. En sia parolado li bone esprimis la valoron de propra hejmo: "Por nia plua, pli intensa laboro estas bone scii, ke ni en nia hejmo havas centron kaj fortan bazon por nia laboro, tiel, ke nia klubo povos teni sian pozicion kiel fortikan, sudan bastionon de nia sveda esperantomovado." Muzikis s-inoj Atlas, Regander kaj Wallin.

11/9. Ordinara kunsido. Klubaj aferoj estis pritraktataj.

23—29. Esperanto-ekspozicio.

3/10. S-ino Ervart el Estonio parolis pri "Estonio kaj la estona kulturo". La paroladon estonlingvan s-ro Kalmus tre lerte esperantigis. Li ankaŭ laŭtleĝis rakonton de August Gailit, unu el la plej famaj verkistoj en Estonio. Vestita en ege bela estona nacikostumo f-ino Peeker dolĉe kantis estonajn kantojn.

13/10. Regis ankaŭ tre internacia atmosfero kiam kvar polinoj respondis por la programo. Ĝi altiris multajn aŭskultantojn. Precipe multaj membroj kiuj malofte vizitas la kunvenojn trovis la vojon tien. La studhejmo estis bele ornamita per polaj flagoj. F-ino Kaiser parolis pri "Polujo dum la milito". F-ino Gembalska pri "Polujo kaj ĝia historio", kun lumbildoj. F-inoj Wisniewska kaj Cadosier kantis polajn kantojn. La aplaŭdoj kulminiis kiam la laste nomita fraŭlino tute surprize ĉe la kafotablo kantis la svedan kanton: "Somarmarnatt" de Stevens.

17/10. S-ro Elmar Kalmus, Estonio, faris parolon pri: "La kafo nr 1 inter la viveliksiroj de la svedoj". Oni ĉiam admiras lian klaran kaj bonan elparolon esperantan. La ideon por la prelego li eble ricevis kiam li dum la jaro partoprenis la kunvenojn en la studhejmo.
H - d u r.

Norrköpings Esperantoklubb höll 22/9 ett av pressen mycket uppmärksammat och för övrigt lyckat möte å Statsrådssalen. 35 deltagare med representanter från inte mindre än 6 olika nationer. Östergötlands Dagblad uppmärksammade mötet med fotografering.

23/9 höll dr Szilágyi ett anförande om esperanto samt provlektion för ett femtontal ungdomar i Jursla. 24/9 liknande för ett 40-tal skolungdomar i Norrköpings stadshus, samt samma dag hölls ett esperantoprogram

å KFUM för ett femtiotal ynglingar. Även vid detta tillfälle gav dr Szilágyi provlektion.

N. y b ö r j a r k u r s e r

i ABF:s studiehjem: för vuxna, ledare: Anders Roos, för gymnasister 16—18 år, ledare: Sven Ragnar, för skolungdom 12—16 år, ledare: Eva Tibbling, i Jursla (Kvillinge skola) för ungdomar 16—20 år, ledare: Nils Johansson.

F o r t s ä t t n i n g s c i r k e l

i ABF:s studiehjem, ledare: Charles Johansson. Dessutom en konversationscirkel.

Skövde esperantoklubb omsatte den 8 november i praktiken en av de principer, efter vilka klubben arbetar och för vilken dess ledande man Lennart Aberg så skickligt propagerar — den om samarbete med andra ideella organisationer. Man hade inbjudit ungdomen i andra föreningar till fest på Hotell Billingen och man fick fullt hus.

Orkester, esperanto-barnkör, föredrag om Esperanto, allsång, bokutställning och förfriskningar. Ortstidningarna tillkännage klar succès, och klubbens kurser fingo många nya adeptter. — Ni kore gratulas!

Redan den 10 november var det klubbens tur att vara gäst. Vård var då Skövde kyrkliga ungdomsförbund, som bjöd på föredrag och musik i Församlingshemmet.

Stockholm. Dum la mardaj vesperoj okazas kurso por 30 komencantoj (en la komenco de la kurso estis nur 17 personoj) en Kungsholmens Kommunala Flickskola. Gvidas T. Morariu laŭ la Cshe-metodo. Dum jaŭdoj en la sama lernejo kaj dum vendredoj ĉe Ny-torgsgatan 15 okazas daŭrigaj kursoj, gvidataj de sinjorino Eva Julin. La kursoj estas organizitaj de Stockholms Esperantoförening.

Sundbyberg. Ĉiun lundvesperon kurso de T. Morariu por 3 tramistoj (komence nur 2). Aranĝinto ABF.

Esperantoklubo de Västerås, La 17/9. Szilágyi faris en la liceoj tri prelegojn svede pri Hungario. Samtage kunveno kun 13 partoprenantoj dum kiu Szilágyi gvidis la programon. La sekretario Anders Bergsten parolis pri esperanto ĉe kunveno de "Försvarsmaktens civila personal". Tiu loka asocio elektis lin reprezentanto por la SLEA-kongreso en Kalmar. Szilágyi faris prelegojn ankaŭ en Köping, Kolsva kaj Valskog. Artikoleto pri la libro "La Fino" aperis en VLT.

Esperantoklubo de Västerås. La klubo kunvenas regule ĉiuvendrede je la 19-a horo ĉe iu el la membroj. Dum ĉiu kunveno ni i. a. studas la libron Hasse Z. 12/10: Bergsten raportis pri la SLEA-kongreso en Kalmar. En Arosgården okazas komenca kurso gvidata de Bergsten kun 8 partoprenantoj, kiuj aŭtomate fariĝos membroj venontjare. Anna Vestberg aranĝis por la klubo loterion kiu donis bonan kontribuon al la kaso. La lokaj gazetoj foje raportis pri la kluba agado. La 9/11 Paul Nylén vizitis nian klubon kaj kontribuis al la programo.

LA RADIA PROGRAMO.

Laŭ la Gazetara Informado la esp-radia programo por la proksima tempo aspektas jene:

Ĉiutage 2300—2315 h Praha 31, 41 m kaj 1571 m oficialaj informoj. Ĉiusabate 2000—2045 h PRA 2 Brasilien? Paroladoj pri esperanto. Ĉiudimanche 1030 h BNRO Kortrijk Belgujo 202.5 Parolado. Ĉiulunde 2110 h Lyon ?m Programo? Ĉiulunde 2220—2230 h Praha I 1571 kaj 470,2 m Informoj. Ĉiumerkrede 1700 h Sofio, Bulgarujo, 352 m. Ĉiujaŭde 2220—2230 h Praha I 1571 kaj 470,2 m Informoj, Ĉiuvendrede 1545 h WRNN Racine Wisconsin, Usono ?m Parolado, La 10.11 1930—1945 h 3SR Aŭstralio 238 m Novajoj.

JUST NI

behöver Esperanta Studservo. Vare sig Ni är en skicklig esperantist eller nybörjare har Studservos kursbrev något att lära Eder. Priset är endast kr. 3: 50 (med examenstexter kr. 3: 90) och beloppet insättes på Malmö Esperantoförenings postgirokonto 387 14.

Korespondado.

W. Smit Fransen, Puttenstr., Rotterdam, Nederlando
koresp. k. ŝanĝo de poŝtmarkoj.

Juna studento, ĉeĥa, kiu vizitas la kvinan klason de reala gimnazio en Zlin, deziras korespondi kun svedo. Krom la esperanta lingvo li lernas kaj jam tute bone scias la rusan, anglan, francan kaj germanan lingvojn.

Miloš Krivda

Zalešná, ul. 6. 13 13, ZLIN, Ĉeĥoslovakio.

Dr Karel Fiala, Letecká 10, Praha-Bubeneč, Ĉeĥoslovakio.

10 kursanoj en Macon, Francujo: Adreso: S-ro F. V. Mathias, 7 Place aux Herbes, Macon (S. L.) Francujo.
S-ro Stefan Rostoniee, Cegielniana 30—17, Łódź. (Polujo.)

S:ino Marcelle Turin, Trépot, Doubs, Francio, peras adresojn.

S-ro Krijt, Veeteelstr., 156, Amsterdam, Nederlando, peras adresojn.

Rikardo H. Osborne. The Farm, Etwall, Derby, 20-jara soldato, studento (kun juna fraŭlino).

Miss Eva Riding, instruistino, 179, Butterstile Lane, Prestwich, Manchester, Anglujo.

Richardson, G. W. F., 2372013, Sign., Signal Section, at 9th Field Regim RA, BLA, kun poŝtisto, ĉ 40-jara.

Robert Valade, 3 Rue de Lépinay, Brive-la-Gaillarde, Corrèze, CCP 682 — 41, Toulouse, Francio.

Mi petas ofertojn.

Sekve de la amerika bombardado je la 31-a de marto 1943 mi perdis ĉiujn miajn esperantaĵojn. Por rekonstrui arkivon kaj bibliotekon mi volas aĉeti ĉiajn aĵojn esperantajn de simpla prospekto ĝis luksa libro, precipe tiujn de **Literatura Mondo** kaj A. E. L. A. kies reprezentanto por Nederlando mi estas.

Ofertojn sendu al: **A. C. van Ingen**, W. Buytewechstr. 128 C., Rotterdam — W, Nederlando.

Deziras korespondi, prefere kun franc(in)o, s:ro G. Petersson, Box 62, Rottne, Svedlando.

Mi deziras korespondi kun samideanoj en la tuta mondo. S-ro **Henry Thomander**, Ålgårdsvägen, 17, Borås, Svedlando.

M. de Ward, Rotterdam, deziras renovigi la kontakton kun svedaj esp:istoj Taanderstraat 19 B, ROTTERDAM W.

Juna sveda ĝardenisto deziras korespondi kun eksterlandaj ĝardenistoj, botanikistoj kaj naturamikoj. S-ro Richard Moholm, Seminaria ĝardeno, Falun, Svedujo.

Rifuĝinto,

faka psikologo akceptas skribaĵojn por scienca, detala grafologia analizo. Prezo de analizo: Kr. 4.—. Adreso: **Prof. A. Garai**, c/o Szilágyi, 3-e Villagatan 26, ing. fr. g., Borås. La esplorotaj skribaĵoj devas esti skribitaj per inko.

Brev och brevkort kunna nu sändas till alla europeiska länder utom Tyskland (obs. även till Österrike). Enda undantaget gäller vykort till Grekland. Brevpostutväxlingen utom Europa är inställd till Tolvoarna, Japan, Franska Indokina, Macao och ett antal öar i Stilla havet, men i övrigt öppen (även till Filipinerna).

Paketpost (bortsett från luftpost) kan sändas till Danmark, Färöarna, Grönland, Finland, Island, Norge, Belgien, Frankrike, Andorra, Monaco, Schweiz, Lichtenstein, Storbritannien och USA samt ett antal länder i Sydamerika.

Interŝanĝas poŝtmarkojn:

— STEN KARLSSON —

Skräddargränd 2 A III

Stockholm (Svedujo),
prefere kun eksterlando.

KIOM VI SCIAS?

Esploru vian scion per la malkara libreto

ĈU VI SCIAS?

Kompilita de WILFRID M. APPLEBY.

La libreto enhavas 200 demandojn, kiuj interesas esperantistojn. Provu — la ĝustaj respondoj troviĝas en la dua parto de la libro. Ĝi igas vin pensi:

Jen provo pri la demandoj:

1. En kiu jaro Esperanto aperis?
7. Donu la nomon de tri gravaj foiroj, kiuj konstante uzis Esperanton.
19. Kiu registaro eldonis statistikajn raportojn en Esperanto?
24. Kio estas "spesmilo"?
25. Kiu universala kongreso estis la plej granda?
35. Preskaŭ ĉiu homo havas tri pomojn. Kiuj ili estas?
52. En kiu Charlie Chaplin-filmo aperis vortoj en Esperanto?
130. Kiu enkondukis la ideon de "Esp.-ŝlosiloj"?
134. En kiu brita universitato estas katedro de Esperanto?
146. Kiun lingvon oni parolas en Kubo? ktp ktp.

Ĉu vi estas scivola? Aĉetu do la libron! Utila kaj amuza. Rekomendata por grupa aŭ individua ekzerco.

Prezo: 1 kr. + 15 % imposto kaj afranko.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 190 71 STOCKHOLM 19 Poŝtgiro 5 78

KUN VARMA SIMPATIO

ni atentis la sorton de la ĉeĥoslovaka popolo dum la terure longa okupado kaj ĝian lukton por sia libero. Kaj kun teruro ni legis pri friponaj faroj, punekziloj kaj pri ekonomia elsuĉado de la lando.

Sed nun ni denove povas saluti la ĉeĥoslovakon popolon bonvena estanta libera ŝtato. Kaj ni forte esperas, ke niaj samideanoj tie baldaŭ povos tute reorganizi sian antaŭ la milito tre vivplenan esperantoorganizon.

Religu la konon kun la bela, memorriĉa lando kaj la demokrata popolo per lego de la beleta libro de **G ö s t a H e n r i k s s o n**:

Per motorciklo en tri landoj

en kiu vojaĝo Ĉeĥoslovakio estas la fincelo. La aŭtoro donas multajn interesajn priskribaĵojn kaj detalojn pri lando kaj popolo.

Pro sia facila stilo ĝi krome estas tre utila en studrondoj kaj daŭrigaj kursoj.

Prezo: kr. 0.75, plus 15 % por afranko kaj imposto.

ELDONA SOCIETO ESPERANTO

Fako 190 71 Stockholm 19 Poŝtgiro 5 78

HASSE Z-BOKEN

har som bekant fått en ordlista. Den kostar 50 öre och beställes hos Malmö Esperantoförening, postgirokonto 387 14.

Ankoraŭ ne estas elĉerpita

LA FINO

la majstra kaj interesa militfina dokumento de Grafo Folke Bernadotte.

SED

pro la ĝojiga intereso montrita speciale el la eksterlando, povos okazi, ke la libro tre rapide elĉerpiĝas.

ĈUVI

estas inter tiuj kiuj ankoraŭ ne mendis? Se jes — jen bona konsilo: mendu nun kiam la libro troviĝas.

GI KOSTAS:

kr. 5: 80 (broŝ.) inkl. "oms".

kr. 6: 80 (kart.) inkl. "oms".

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO

Fako 19071 STOCKHOLM 19 Postgiro 578

NENIO OKAZAS

La plej facila legolibro aperis. Bona helpo por ĉiu kursgvidanto. Prezo 2 danaj kronoj.

Mendu ĉe: Christian Hougaard,
Aabyhøj, Danlando.

Nu komma de efterlängttade böckerna!

Vivo de Zamenhof.

Av esperantorörelsens store vältalare
Dr EDMOND PRIVAT.

Denna ypperliga bok, som intimt skildrar vår "mästares" liv och verk och som varit omöjlig att anskaffa till alla dem som under kriget velat ha den, har nu inkommit på nytt. Illustrerad. Kartonnerad.

Pris kr. 5: 50 + 15 % skatt och porto.

Skynda att beställa innan denna första lilla sändning tar slut!

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO.

Box 19071 STOCKHOLM 19. Postgiro 578.

Svenska Esperanto-Tidningen

La Espero

Organ för Svenska Esperanto-Förbundet

Postadr.: Postfack 19071, Stockholm 19.

Redaktör: Eva Julin, Nytorngsgatan 15, 4 tr. ög., Sthlm.

Ansvarig utgivare: W. Wahlund.

Expedition: Förlagsföreningen Esperanto, Sveavägen 98. Stockholm. Tel. 31 65 01. Postgiro 578.

Prenumerationspris: helt år kr. 4:— . Lösnummer 0:35. Utkommer en gång i månaden.

Annonspris: 20 öre pr mm. Korrespondensannons: 1:50.

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET (Sveda Esperanto-Federacio), Tegelbacken, Stockholm C. Tel. 20 00 43. Postgiro 20 12.

Avgifter: Direkt ansluten medlem erlägger 7: 50 kr. pr år och erhåller tidningen gratis. Familjemedlem, som ej erhåller tidning, erlägger 4:— kr. pr år. Förening med kollektiv prenumeration å tidningen för sina medlemmar erlägger för varje medlem en årlig avgift av 5:— kr. För familjemedlem är årsavgiften 2:— kr. Förening, som ej prenumererar kollektivt å tidningen, erlägger för varje medlem 2:— kr. pr år. Varje ansluten förening erhåller ett exemplar av tidningen gratis.

FÖRLAGSFÖRENINGEN ESPERANTO u. p. a., postadress: Box 19071, Stockholm 19 (Expedition: Sveavägen 98.) Tel. 31 65 01. (Förlagschefen: 30 75 15.) Postgiro: 578. (Böcker, tidningar, korrespondenskurser o. s. v.)

SVENSKA ESPERANTO-INSTITUTET, Tegelbacken, Stockholm. Postgiro 5 15 11.

DECEMBER-NUMRET av Espero skall utkomma före den 6/12 1945, och dess redaktion kommer därför att avslutas den 29/11.

Skribu tuj al Borås!

La klubo Verda rondo aranĝos letervesperon la 28:an de novembro kaj atendas multajn leterojn. Skribu hodiaŭ al Fr:o Ragnhild Ahl, Stenkilsgatan 10, Borås, aŭ al S:ro Sixten Andersson, Rundeln 11 C, Borås. Notu sur la koverta "Letervespero".

Ĉiuj leteroj estos respondataj. Do — skribu hodiaŭ!

YTONG

La malvarma norda klimato necesigas varmizolajn ekstermurojn. Ordinara konstrumaterialo tial estis ligno, speciale en kamparo kaj urbetoj. La lignaj konstruaĵoj tamen kaŭzis multajn brulakcidentojn.

Dank al la sveda invento "Ytong" oni nun je modera kosto povas konstrui brulreziste sed varme en malvarma klimato. Ytong estas poroza betono, tiel malpeza ke ĝi povas naĝi sur akvo, sed tamen fortika.

Svedlingva broŝuro havebla senkoste.

YXHULTS STENHUGGERI A.B.
Hällabrottet